★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Brno per tramo

Konatiĝu kun publika transporto en Brno. En Brno vi povas veturi per tramoj, trolejbusoj, aŭtobusoj kaj ŝipoj. Ordinare ni volas veturi el loko A al loko B. Tamen la vojaĝado povas esti aventuro. Ĉu vi forgesis aĉeti bileton? Ĉu okazis akcidento kaj la veturilo ne povas daŭre veturi? Aŭ iu hazarde ŝanĝis viajn planojn kaj vi devas veturi al alia loko? Venu kaj ludu tabloludon Brno šalinou. Lingvo estas facila. Ĉiujn eventojn komentu en Esperanto kaj eĉ sakru, kiam la situacio ne estos agrabla por vi, esperante.

Bedaŭrinde mi ne povos veni, certe ne al la komenco. La ludon alportos Olda.

**Lingvo:** Esperanto, la ĉeĥa

**Preparos:** Milan Kolka

**Kiam:** la 2an de aprilo 2025 je la 17.45-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

La renkontiĝo estos registrata.

★

## Ni rekomendas

- La 18an — 27an de aprilo 2025 Printempas (kursoj de Esperanto, Greziljono, Francio)
- La 9an — 11an de majo2025 Aŭstria Esperanto-Kongreso 2025 (Graz, Aŭstrio)
- La 5an — 13an de julio 2025 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Kaunas, Litovio)
- La 19an — la 26an de julio 2025 58-a ILEI-KONGRESO (Beogrado, Serbio)
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno.
- **Trapasu KER ekzamenon** en Brno. Ĉiuj eblaj niveloj (de B1 ĝis C2)

★

## Cetera programo aprilo

La 9-an **Brno praktike** – Milan Kolka, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
La 16-an **Vivo en "kvazaŭ"-epoko** – Odřich Arnošt Fischer, klubejo
La 23-an **Ekparolu** – Maurizio Giacometto (Rico), rete per Jitsi
La 30-an *Ankoraŭ ne agordita*, klubejo

Mi petas vin, ke vi jam primensu programon por aprilo kaj majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Koran dankon.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),

- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto